# 被団協にノーベル平和賞

被団協（日本原水爆被害者団体協議会）がノーベル平和賞を受けた。これは、日本の平和運動にとっての大きな励ましである。

原爆が広島に落とされたのが1945年8月6日、長崎に落とされたのが8月9日である。その年の終わりまでに亡くなった人は、広島で約14万人、長崎が7万4千人である。また、被ばくした人は広島で35万人以上、そしてその中で亡くなった人は毎年広島平和公園の原爆死没者慰霊碑に名前が追加奉納され、その数は2022年8月6日現在で、33万3,907人に及んでいる。長崎では、当時の人口が24万人が被ばくしたと考えられ、その中で亡くなった人の名前は、国立長崎原爆死没者追悼平和祈念館に納められていて、2024年8月9日現在、その数は19万8785人に及んでいる。

戦後は、日本はアメリカの占領下にあり、被ばくの実相が外部に漏れることを恐れたアメリカ占領軍は、プレスコード（報道規制）を敷き、原爆に関する報道を制限した。プレスコードの規制が緩んだ1952年、雑誌アサヒグラフの8月6日特集号（発行約70万部）で、熱線を浴びた女性などの写真が紹介された。この時、その号の朝日グラフを世界に送って、被ばくの実相を世界に広げようという運動が起こり、エスペランチストもその一翼を担った。




1954年、アメリカによるマーシャル群島ビキニ環礁での水爆実験で、日本のマグロ漁船第5福龍丸が被ばくし、乗組員の一人久保山愛吉さんが亡くなった。久保山さんが亡くなったことで、被爆した船はこの一隻だけだったように政府もマスコミも取り扱ったが、実はその他1000隻ものマグロ船が被ばくしていた。しかし、アメリカ政府と日本政府は、当初は「第五福龍丸はスパイ活動をしていた」などのデマを流し事実を隠蔽しようとしたが、それが出来なくなると、涙金で船主などを買収し、事件を収束させた。しかし、この被ばくで被害を受けた元漁民は、今も裁判を闘っている。被団協の名前に「原水爆被害者」とあるのは、これらの水爆実験の被害者も含めての運動だからであろう。

当時私は小学生だったが、人々は魚を買うのをやめ、魚屋さんは大きな被害を被った。雨が降るたびに、「放射能雨で頭の毛が抜ける」などと騒いだ。この当時の放射能汚染は、2011年の福島原発の事故からの放射線よりも強かったと思われる。現在、日本人ががんで死亡する確率は、男性25.1%（4人に1人）、女性17.5%（6人に1人）というが、私は、これは、ビキニの水爆実験の放射能が原因ではないかと疑っている。

第五福龍丸の被ばくは大きな衝撃を日本社会に与えた。1954年には、東京の主婦が始めた原水爆禁止の署名運動は、瞬く間に全国に広がり、署名は3200万人に達した。1955年には、広島で5千人が集まって「第一回原水爆禁止世界大会」が開かれ、長崎で開かれた第二回の原水爆禁止世界大会で、日本被団協が結成された。世界に珍しい母親運動も、この署名運動の中から生まれ、1955年6月には第1回母親大会が開催され、今も「原水爆禁止」「子どもの生命を守る」の訴えを続けている。また「うたごえ運動」

も、1954 年には原爆禁止運動と結び付いて、「原爆ゆるすまじ」などの反核の歌を普及しながら、発展した。




結成された被団協は、原爆被災者の援護の拡大を求める運動を開始し、それは被ばく者援護法など一定の前進を見たが、政府は被爆者に対して冷淡であったし、今もその姿勢は変わらない。例えば、原爆症の認定も厳しく、認定されなかった被爆者は、2003 年に各地で集団訴訟を起こした。また、原爆投下後に、放射能を含んだ「黒い雨」が、被災地を越えて広範に降り、それによる原爆症に罹った人も多かったが、それも原爆被害と認定されず、裁判闘争を行っている。このように、日本政府は、原爆被災者の救済に後ろ向きで、被団協などの運動で、やっと少しずつ譲歩しているというのが実情である。これはその他の戦争被害である空襲被害者に対しても同様で、政府は一貫して補償を拒否している。こうした戦争被害者は高齢化し、時間がもうない。それなのに、政府はかたくなに支援を拒否し、裁判でも、こうした被害者を「金目当ての輩」と言わんばかりの態度で、被爆者を更に痛めつけている。

今回の被団協のノーベル平和賞の受賞は、日本の平和運動にとっての大きな激励である。戦後日本は平和憲法を持ち、「軍備を持たない」「戦争はしない」を基本原則として歩んできた。その中で、核兵器に関しても、「非核三原則」（核兵器を持たず、作らず、持ち込ませず）を国是にさせてきた。しかし、アメリカの支配下にある保守政治は、これらの原則を少しずつ掘り崩し、まずは自衛隊という名の軍隊を発足させ、今では、専守防衛だった自衛隊に長距離ミサイルを持たせ敵基地攻撃を可能にする、アメリカと一緒に闘えるようにする、防衛費を倍増する、などの方針転換を、国民の同意もなしに強行している。

被団協の運動は、被爆者支援中心の運動から、「これ以上被爆者を作らない」という平和運動へと大きく発展してきている。そしてその運動の基盤に、平和憲法や「非核三原則」がある。被団協が平和賞を受けたということは、被団協が寄って立つ、こうした平和思想が評価されたことでもある。そういった意味では、首相は被団協に祝意を表明したが、内心では、「被団協なんかに平和賞を出しやがって」と苦虫をかみつぶしているに違いない。日本の民主勢力は、戦後長きにわたって、様々な分野で平和運動を展開してきた。今回の被団協の受賞は、同時に、そういった日本の民主運動への高い評価ともいえる。我々は、これからも、保守勢力の弾圧にも負けず、平和への道を進んで行かなければならない。




以下に、2024 年 10 月 12 日発行の日本共産党の機関紙「しんぶん赤旗」からの記事とそのエスペラント訳を載せる。写真（田中さん以外）、注は堀が加えた。

# Nobel-premio pri paco aljuĝita al Nippon-Hidankjoo

Nippon-Hidankjoo (Japana Asocio de Viktimoj de Atomaj kaj Hidrogenaj Bomboj) ricevis la Nobel-premion pri paco. Tio estas granda instigo al la pacmovado de Japanio.

La atombomboj estis ĵetitaj sur Hiroŝimon la 6-an de aŭgusto 1945 kaj sur Nagasakon la 9-an de aŭgusto 1945. Antaŭ la fino de tiu jaro, ĉirkaŭ 140,000 homoj mortis en Hiroŝimo kaj 74,000 en Nagasako. Krome, pli ol 350,000 homoj estis eksponitaj al radioaktiveco en Hiroŝimo, kaj la nomoj de tiuj, kiuj mortis poste, estas aldonitaj al la nomaro metita en la Cenotafon por la Atombombaj Viktimoj en Hiroŝima Paca Parko ĉiujare, kaj je la 6-a de aŭgusto 2022, la totala nombro da mortintaj homoj estis 333 907. En Nagasako, la tiama loĝantaro laŭsupoze estis 240,000 homoj, kaj la nomoj de tiuj, kiuj mortis pro la atombombo kaj postaj suferoj, estas sanktigitaj en la Nacia Pacparko de Nagasako por atombombitaj viktimoj ĉiujare la 9-an de aŭgusto 2024. La nombro nun estas 198,785.

Post la milito, Japanio estis sub la regado de Usono, kaj la usonanoj, timante, ke la kruela realeco de radioaktiveca ekspono estos tralikita al la ekstera mondo, trudis gazetaran kodon kaj limigis raportadon pri la atombomboj. En 1952, kiam la gazetara kodo estis malstreĉita, la 6-an de aŭgusto speciala numero de la foto-revuo Asahi Graph (ĉirkaŭ 700,000 ekzempleroj publikigitaj) prezentis fotojn de virinoj eksponitaj al varmoradioj.Ekestis movado por sendi la gazeton al la mondo kaj disvastigi la veron pri la atombombadoj, kaj ankaŭ esperantistoj ludis rolon en tiu ĉi movado.



En 1954, la japana tinusfiŝkaptista ŝipo Daigo Fukurjuu Maru (Feliĉa Drako n-ro 5) estis eksponita al forta radioaktiveco dum eksperimentoj de hidrogenbomboj faritaj de Usono ĉe Bikini-atolo en la Marŝala Insularo, kaj unu el ĝiaj ŝipanoj, s-ro Kubojama Aikiĉi, mortis. Post lia morto la registaro kaj amaskomunikiloj traktis ĝin kvazaŭ ĉi tiu estus la unu nura ŝipo, kiu estis elmetita al la hidrogenbombo, sed en realeco, ĉirkaŭ 1,000 aliaj tinusŝipoj estis elmetitaj al radioaktiveco. Tamen, la usonaj kaj japanaj registaroj komence provis kaŝi la veron, disvastigante malverajn onidirojn kiel "Daigo Fukurjuu Maru okupiĝis pri spionado", sed kiam tio iĝis malebla, ili uzis monon por silentigi la ŝipposedantojn kaj finigis la okazaĵon. Tamen poste iamaj fiŝkaptistoj, kiuj suferas pro la radioaktiveco, komencis batali kaj plu batalas en tribunaloj. La kialo, ke la nomo de Hidankjoo inkluzivas "Viktimojn de atomaj kaj hidrogenbomboj", verŝajne estas, ke la movado inkluzivas

viktimojn de la hidrogenbombadoj.

Mi estis tiutempe bazlernejano. Homoj ĉesis aĉeti fiŝojn, kaj fiŝvendejoj multe suferis. Ĉiufoje kiam pluvis, ni faris tumulton, dirante "Mi perdos mian hararon pro la radioaktiva pluvo." La radioaktiva poluado en tiu tempo verŝajne estis pli forta ol tiu de la nuklea akcidento de Fukuŝima en 2011. Nuntempe multaj japanoj mortas pro kancero (25,1% el la viraj mortintoj kaj 17,5% el la virinaj mortintoj), kaj mi suspektas, ke tio estas kaŭzita de la radioaktiveco el la usonaj eksperimentoj de hidrogenbomboj en Bikini.

La afero de la Daigo Fukurjuu Maru havis enorman ŝokon al la japana socio. En 1954,






subskriba kampanjo por malpermesi atomajn kaj hidrogenajn bombojn komencita de dommastrinoj en Tokio rapide disvastiĝis tra la lando, atingante 32 milionojn da subskriboj (foto). En 1955, 5,000 homoj kolektiĝis en Hiroŝimo por la "Unua Monda Konferenco por Malpermeso de Atomaj kaj Hidrogenaj Bomboj," kaj ĉe la dua Monda Konferenco en Nagasako, Nippon-Hidankjoo estis formita. Patrina movado naskiĝis el ĉi tiu subskriba kampanjo, kaj la unua konferenco de patrinoj okazis en junio 1955, kaj la movado daŭras kun devizoj "Malpermesu atomajn kaj hidrogenajn bombojn" kaj "Ni protektu infanojn." Ankaŭ la kant-movado disvolviĝis en 1954, popularigante kontraŭnukleajn kantojn kiel "Ne permesu atombombojn".

Nippon-Hidankjoo komencis movadon postulantan por subteno al la pluvivantoj de la atombomboj. Kvankam tiu movado vidis progreson, inkluzive de la leĝaro por helpi atombombopluvivantojn, la registaro restis indiferenta al la viktimoj, kaj daŭre estas tia. Ekzemple, estas malfacile ricevi tiun helpon por la pluvivantoj, kiuj devas atesti sian atombombitecon, do pro tio pluvivantoj nun grupe batalas en tribunaloj en diversaj gubernioj. Krome, post kiam la atombomboj estis ĵetitaj, "nigra pluvo" enhavanta radioaktivecon falis super larĝa areo ekster la katastrofa areo, kaj multaj homoj suferis de atombombo-malsano, sed tio ne estis rekonita kiel atombombo-damaĝo do jura batalo okazis. La japana registaro malvolontas oferti helpon al la viktimoj de atombomboj, kaj nur malrapide faras koncedojn pro movadoj de Hidankjoo kaj la aliaj. Samo okazas ankaŭ por aviadilatakaj viktimoj, alia formo de militdamaĝo, por kiu la registaro konstante rifuzas kompenson. Ĉiuj militviktimoj maljuniĝas kaj tempo mankos por ili. Malgraŭ tio, la registaro obstine rifuzas doni helpon, kaj en juĝejoj la

registaraj advokatoj fojfoje agaĉas, traktante tiujn viktimojn kiel monavidulojn kaj plue vundante ilin.

La aljuĝo de la Nobel-premio pri paco al Hidankjoo estas granda kuraĝigo al la pacmovado de Japanio. Post la milito, Japanio havis pacan konstitucion, kiu deklaras, ke Japanio ne posedu armilarojn kaj ne militu. Koncerne nukleajn armilojn, Japanio havas "Tri Nenukleajn Principojn" (ne posedas, ne produktas kaj ne enkondukas nukleajn armilojn) kiel nacian politikon. Tamen, la konservativa registaro sub la kontrolo de Usono iom post iom subfosis tiujn principojn, komencante kun la establado de militistaro nomita Memdefenda Trupo, nun provante ekipi la Memdefendan Trupon per longdistancaj misiloj por ataki malamikbazojn, ebligante al Japanio batali kune kun Usono kaj duobligante defendajn buĝeton, sen konsento de la popolo.

La movado de Hidankjoo signife evoluis de la movado centrita pri subteno al la postvivantoj de atombomboj al pacmovado celanta "ne plu nasku viktimon de atombombo". Ĉe la fundamento de ĉi tiu movado estas la japana paca konstitucio kaj la "Tri Nenukleaj Principoj". La fakto, ke Hidankjoo ricevis la Pacan Premion estas rekono de la pacideologio, kiun Hidankjoo reprezentas. Tiusence, la ĉefministro esprimis sian gratulon al Hidankjoo, sed en sia koro li tre bedaŭras, ke la Nobel-komitato altetaksis la agadojn de Hidankjoo, kiu havas demokratian principon. La demokratiaj grupoj de Japanio ekde la fino de la milito jam longe okupiĝas pri pacmovadoj en diversaj kampoj. La premio ricevita de Hidankjoo povas esti rigardata ankaŭ kiel alta rekono de la demokratia movado de Japanio. Ni devas daŭre antaŭeniri sur la vojo al paco sen cedi al la subpremo de konservativaj fortoj.




Mia desegnaĵo kun simbolaj statuo kaj konstruaĵo kaj la devizo “Nukeaj armiloj kaj homaro ne povas kunekzisti”.

Ĉi-sube estas artikoloj de la oficiala ĵurnalo de la Japana Komunista Partio "Ŝinbun Akahata" publikigita la 12-an de oktobro 2024, kaj ĝia Esperanta traduko farita de mi. Fotoj (krom Tanaka) kaj notoj estis aldonitaj de mi.

# 日本被団協にノーベル平和賞

**核なき世界へ実相広める**
**被爆者の草の根運動を評価**

ノルウェー・ノーベル賞委員会は 2024 年 10 月１１日、今年のノーベル平和賞を日本原水爆被害者団体協議会（日本被団協）に授与すると発表しました。長年の地道な活動で、被爆の実相を世界に広げ、核兵器の非人道性を明らかにし、核兵器禁止条約へのうねりをつくり出してきた活動が認められたものです。

---

ノーベル賞委員会は、授賞理由として「広島と長崎の原爆生存者によるこの草の根の運動は、核兵器のない世界を達成する努力、また目撃証言を通じて核兵器が二度と使われてはならないということを身をもって示してきた」と評価。また、「日本被団協と他の被爆者の代表たちによる並外れた努力は、核のタブーの確立に大きく寄与してきた」とのべ、「肉体的な苦痛と痛切な記憶にもかかわらず、大きな犠牲を伴う自らの体験を、平和のための希望と活動にささげることを選んだすべての生存者に栄誉を授けたい」としています。

日本被団協は被爆者の唯一の全国組織として、広島・長崎への原爆投下から１１年後の１９５６年８月１０日、第２回原水爆禁止世界大会の２日目に長崎で結成されました。結成宣言＝世界への挨拶（あいさつ）は「自らを救うとともに、私たちの体験をとおして人類の危機を救おう」とのべ、「ふたたび被爆者をつくるな」と叫び続けてきました。

原爆が被爆者のいのち、からだ、くらし、こころに加えた被害を明らかにし、「核戦争起こすな、核兵器なくせ」「原爆被害に国家補償を」の二大要求をかかげ運動。悲惨な体験を国内はじめ世界で証言し、国連での原爆展も開催。被爆の実相を広め続けてきました。

２０１６年には、被爆者が初めて世界に呼びかけた「ヒロシマ・ナガサキの被爆者が訴える核兵器廃絶国際署名」（ヒバクシャ国際署名）を開始し、２０年までに１３７０万２３４５人分の署名を国連に提出しました。

こうした国内外での被爆者の訴えが世界の人びとを動かし、１７年、核兵器禁止条約の国連会議での採択に大きな役割を果たしました。

１７年には核兵器廃絶国際キャンペーン（ＩＣＡＮ）が平和賞を受賞しています。




忍岡妙子さん（広島のエスペランチスト）は、一人で 11 万の署名を集めました。その記念の写真です。

S-ino Oŝioka Taeko, esperantisto loĝanta en Hiroŝimo, sola kelektis 110 000 subskribojn.

# Nobel-premio pri paco aljuĝita al Nippon-Hidankjoo

**Disvastigi la veron por efektivigi la mondon sen nukleaj armiloj**
**Taksante la popolan movadon de postvivantoj de atombombo**

La 11-an, la norvega Nobel-premia Komitato anoncis, ke la ĉi-jara Nobel-premio pri paco estos aljuĝita al Japana Asocio de Viktimoj de Atomaj kaj Hidrogenaj Bomboj (Nippon-Hidankjoo). Ĝi altetaksis la klopodojn, kiuj estis faritaj de Nippon-Hidankjoo dum multaj jaroj por disvastigi la veron pri la atombombadoj al la mondo, malkaŝi la malhomecon de nukleaj armiloj kaj krei impeton por la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj.

La Nobel-premia Komitato donis la premion al Nippon-Hidankjoo laŭ jena taksado: "Ĉi tiu popola movado de pluvivantoj de la atombomboj de Hiroŝimo kaj Nagasako klopodis atingi la mondon liberan de nukleaj armiloj kaj per la propraokulaj atestaĵoj de la atombombitoj (*hibakuŝa*-oj) montris, ke nukleaj armiloj neniam plu estu uzata." "La eksterordinaraj klopodoj de Nippon-Hidankjoo kaj aliaj *hibakuŝa*-aj reprezentantoj multe kontribuis al la starigo de la nuklea tabuo," kaj "Malgraŭ la fizikaj doloroj kaj kortuŝaj memoroj, multaj *hibakŝa*-oj elektis dediĉi siajn spertojn al espero kaj agado por paco. Ni honoras ĉiujn pluvivantojn."

Nippon Hidankjoo, la nura nacia organizo de pluvivantoj de atombomboj, estis formita en Nagasako la 10-an de aŭgusto 1956 en la dua tago de la Dua Monda Konferenco por Malpermesi Atomajn kaj Hidrogenbombojn, 11 jarojn post kiam la atombomboj estis ĵetitaj sur Hiroŝimon kaj Nagasakon. La fonda deklaro de la organizo, kiu estas saluto al la mondo, tekstis, "Ni savu nin kaj, per niaj spertoj, savu la homaron de la krizo", kaj daŭre apelaciis, "Neniam plu kreu alian atombomban viktimon."

La movado malkaŝis la damaĝojn, kiujn la atombomboj kaŭzis al la vivoj, korpoj, vivrimedoj kaj mensoj de la postvivantoj, kaj faris du gravajn postulojn: "Ne komencu nuklean militon, forigu nukleajn armilojn" kaj "La japana registaro kompensu la damaĝojn kaŭzitajn de la atombomboj." Postvivantoj atestis pri sia tragikaj spertoj kaj enlande kaj tra la mondo, kaj eĉ okazigis ekspozicion pri atombomboj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ili senlace diskonigis la realecon de la atombombadoj.

En 2016, Nippon Hidankjoo lanĉis "la Kolekton de subskriboj internacie", la unuan peticion de pluvivantoj apelacianta al la mondo, kaj antaŭ 2020, ĝi sukcesis kolekti 13,702,345 subskribojn kaj prezenti tiujn al la Unuiĝintaj Nacioj.

La voĉoj de la postvivantoj de atombomboj en Japanio kaj en eksterlando movis homojn tra la mondo, kaj ludis gravan rolon en la adopto de la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj ĉe la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en 2017.

En 2017, la Internacia Kampanjo por Nuligi Nukleajn Armilojn (ICAN) gajnis la Pacan Premion.

# 受賞　本当にうれしい

**日本被団協代表委員　田中熙巳さん**



日本被団協がノーベル平和賞を受賞できたことは本当にうれしいです。

ロシアが核威嚇を繰り返し、世界でブロック対立が起きている中、核兵器が使用されるのではないかと本気で心配していました。

被爆者は、「核兵器と人類は共存できない」とずっと訴えてきました。そのことが多くの人に通じたのではないかと思います。

被爆者が国内や世界で被爆の実相を広げ、共同のなかで核兵器禁止条約をつくらせてきました。さらに、核廃絶を目指した条約の強化に努めなければなりません。

そのためには、日本政府が禁止条約を批准するだけでなく、核兵器廃絶に向け、世界のリーダーになってほしい。

多くの皆さんに呼びかけたい。日本の禁止条約の署名・批准と、核兵器廃絶に向けて、一緒に声をあげ、行動してほしい。

# Mi tre ĝojas ricevi la premion

**Reprezentanta komitatano de Nippon-Hidankjoo s-ro Tanaka Terumi**

Mi estas vere feliĉa, ke Nippon-Hidankjoo ricevis la Nobel-premion pri paco. Rusio plurfoje minacis la mondon per nukleaj armiloj kaj tra la mondo okazas konfliktoj inter grandaj landoj, tial mi estis serioze maltrankvila ke nukleaj armiloj povus esti uzataj.

Pluvivantoj de atombomboj longe apelaciis, ke "nukleaj armiloj kaj la homaro ne povas kunekzisti." Mi pensas, ke tiu apelacio movis multajn homojn.

A-bombopluvivantoj disvastigis la veron pri la atombombadoj kaj enlande kaj tra la mondo, kaj ludis gravan rolon naski la Traktaton pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj.




Ni plu devas klopodi plifortigi la Traktaton celantan forigon de nukleaj armiloj. Tiucele mi ŝatus, ke la japana registaro unue ratifu la Traktaton kaj samtempe fariĝu mondgvidanto pri forigo de nukleaj armiloj.

Mi ŝatus alparoli la publikon. Mi ŝatus, ke ĉiuj agadu kune por ke la japana registaro subskribu kaj ratifu la Traktaton kaj por forigu nukleajn armilojn.

Foto: sur la panelo estis skribite “Nukleaj armiloj kaj la homaro ne povas kunekzisti.”

# これが国際社会の声

## 「核抑止」から脱却　今こそ




１９４５年８月、広島・長崎に原爆が投下され、まもなく８０年となるタイミングで、核兵器廃絶に向けて地道な取り組みを続けてきた日本被団協がノーベル平和賞を受賞しました。長年、核兵器廃絶へ国内外で地道な努力を続けてきた被団協や無数の被爆者、そして街頭で署名に取り組んできたすべての市民に対する評価といえます。

２０１７年、人類史上初めて核兵器を違法化した核兵器禁止条約が国連で１２２カ国の賛成により採択され、同年のノーベル平和賞は核兵器廃絶国際キャンペーン（ＩＣＡＮ）が受賞。そして今年は、同条約の採択を草の根の運動で進めてきた日本被団協の受賞です。核兵器はいかなる理由でも二度と使用してはならない、核戦争は絶対に起こしてはならない、核兵器は今すぐに廃絶しなければならないというのが、国際社会の明確なメッセージであるといえます。

注： 2017 年 9 月 20 日から各国による署名が開始され、2020 年 10 月 24 日に、批准した国が発効要件である 50 か国に達しました。 条約は、批准から 90 日後となる 2021 年 1 月 22 日に発効を迎えました。




世界の現状を見れば、ロシアが繰り返し、ウクライナでの核使用の可能性を明言。米国や中国は核弾頭や戦略爆撃機・潜水艦の近代化を進めています。ノーベル委員会はそうした現状を踏まえ、「人類史上のこの瞬間に、核兵器が何であるかを思い起こす価値がある。核兵器とは、世界がこれまでに見た中で最も破壊的な兵器である」と指摘しています。

本来なら、唯一の戦争被爆国である日本政府がそうしたことを国際社会に訴え、「核兵器のない世界」を主導する責任があります。ところが、政府は米国の「核抑止」に固執する立場から核禁条約への参加を拒否。同条約締約国会議へのオブザーバー参加さえ否定しています。それればかりか、「核の傘」＝「拡大抑止」をいっそう強化するための日米閣僚級協議まで創設しました。石破茂首相にいたっては、就任直前に発表した米シンクタンクへの寄稿文で、米国との「核共有」や「核持ち込み」を主張し、“国是”である「非核三原則」を明確に否定。最悪の補完勢力である維新・国民も「核共有」や原子力潜水艦の保有を繰り返し主張しています。立民の主張も核禁条約締約国会議へのオブザーバー参加にとどまっており、条約参加を明言していません。

注：非核三原則　「核兵器を持たず、作らず、持ち込ませず」で、日本政府の基本方針。1968 年、佐藤栄作首相が国会で言明。

政府やこれら各党に共通しているのは「日米同盟絶対」の立場です。中国やロシアに対抗するため、米国の「核抑止」を絶対視していることです。

政府はこれ以上、国際社会に恥ずべき姿をさらすことをやめ、ただちに核禁条約への参加を決断すべきです。核兵器の惨禍を訴える先頭に立ち、「核抑止」から抜け出す道を選ぶべきです。（竹下岳）

**Tiu ĉi estas la voĉo de la internacia komunumo,**
**For de la politiko "Dependo de nukleaj armiloj"**

En aŭgusto 1945, preskaŭ 80 jarojn post kiam la atombomboj estis ĵetitaj sur Hiroŝimon kaj Nagasakon, Nippon-Hidankjoo, kiu daŭre klopodis por la forigo de nukleaj armiloj, ricevis la Nobel-premion pri paco. Ĉi tio estas alta taksado al Nippon-Hidankjoo kaj la sennombraj postvivantoj de atombomboj, kiuj persiste klopodis enlande kaj eksterlande por forigo de nukleaj armiloj, kaj al ĉiuj civitanoj, kiuj dum multaj jaroj klopodis kolekti subskribojn.

En 2017 la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj, kiu igis nukleajn armilojn kontraŭleĝaj unuafoje en la homa historio, estis adoptita de 122 landoj en la Unuiĝintaj Nacioj, kaj en la sama jaro la Internacia Kampanjo por Forigo de Nukleaj Armiloj (ICAN) ricevis la Nobel-premion. Ĉi-jare la pacpremion ricevis Nippon-Hidankjoo, kiu antaŭenigis la adopton de la Traktato per popolaj movadoj. La klara mesaĝo de la internacia komunumo estas, ke nukleaj armiloj neniam devas esti uzataj denove ial kaj ie ajn, ke nuklea milito neniam devas okazi, kaj ke nukleaj armiloj devas esti aboliciitaj tuj.

Noto: Subskriboj de ĉiu lando komenciĝis la 20-an de septembro 2017, kaj la 24-an de oktobro 2020, la nombro de ratifitaj landoj atingis la postulon por ekvalido, kiu estas 50 landoj. La Traktato ekvalidis la 22-an de januaro 2021, 90 tagojn post ratifiko.

Rigardante la nunan situacion de la mondo, Rusio plurfoje deklaris la eblecon uzi nukleajn armilojn en Ukrainio. Usono kaj Ĉinio modernigas siajn nukleajn armilojn kaj strategiajn bombaviadilojn kaj submarŝipojn. Konsiderinte tiujn aferojn, la Nobel-premia Komitato atentigas nin jene: “En ĉi tiu momento en la homa historio, indas memori, kio estas nukleaj armiloj. Nukleaj armiloj estas la plej detruaj el tiuj, kiujn la mondo iam havis."

La japana registaro, kiel la sola lando, kiu suferis atombombojn en milito, havas la respondecon apelacii al la internacia komunumo kaj ekgvidi krei "mondon liberan de nukleaj armiloj". Tamen ĝi rifuzis partopreni en la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj pro sia dependo de la "nuklea politiko" de Usono. Ĝi eĉ ne partoprenas kiel observanto en la Konferenco de la ratifintaj landoj de la Traktato. Ne nur tio, ĝi eĉ establis Japan-Usonan ministerinivelan intertraktadon por plifortigi la "nuklean ombrelon" kaj la "defendon per longdistancaj misiloj". La ĉefministro Iŝiba Ŝigeru, en kontribuo al usona pensfabriko publikigita ĵus antaŭ enoficiĝo, rekomendis "nuklean kundividon" kun Usono kaj "enkondukon de nukleaj armiloj en Japanion", kaj klare pledis forĵeton de la "Tri nenukleaj principoj"* de Japanio. Ankaŭ aliaj dekstraj partioj Iŝin kaj Kokumin-Minŝu plurfoje pledis "nuklean kundividon" kaj posedon de atomsubmarŝipoj. Alia plej granda opozicia partio Rikken-Minŝu proponas nur

partoprenon de Japanio kiel observanto en la Konferenco de la ratifintaj landoj de la Traktato, kaj ne deklaris klare, ke Japanio partoprenu en la Traktato.

Noto: La Tri Nenukleaj Principoj: “Japanio ne posedu, ne produktu, ne enkonduku nukleajn armilojn", la baza politiko de la japana registaro. En 1968, ĉefministro Satoo Eisaku deklaris tion en la Dieto.

Kion la registaro kaj ĉiu el ĉi tiuj partioj havas komune, estas la absoluta subteno al "Japana-Usona alianco". Ili konsideras la dependon de Usono kiel absoluta, sola rimedo por kontraŭstari Ĉinion kaj Rusion.

La registaro devus tuj ĉesi montri en la internacia komunumo sian mizeran pozicion kaj decidi aliĝi al la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj. Ĝi devus gvidi la mondon, montrante vaste la terurajn damaĝojn kaŭzitajn de la du atombomboj kaj elekti la vojon de “forigo de nukleaj armiloj”, ne dependante de "nukledependa politiko".

(Verkita de Takeŝita Takeŝi)